



# Lumo

ISSN: 0827-3154

## ENHAVO | SKIZO

Kanadaj novaĵoj	3
Raportoj kaj kontribuaĵoj	22
Diversaĵoj	47

## LIMDATO

POR LA VENONTA NUMERO

La 15a de Januaro 2017

[lumo.revuo@gmail.com](mailto:lumo.revuo@gmail.com)

Lumo estas la revuo de  
La Kanada Esperanta-Asocio.  
Por membriĝi en KEA, vizitu nian retejon.


## DETALE ENHAVO DE LA NUMERO

Kolumno de la redaktorino	1	<b>RAPORTOJ KAJ KONTRIBUAĴOJ</b>	<b>22</b>
<b>KANADAJ NOVAĴOJ</b>	<b>3</b>	Ni spertis la 101-an	
Esperantistoj — ĉu novaj		Universalan Kongreson de Esperanto	22
« bestoj » en Granbio?	3	IJK 2016 en Vroclavo:reta foto-albumo	30
Mia sperto dum NASK	5	Legendo de Niagara Akvofalo	35
Kelkaj vortoj pri Monda Socia Forumo	8	Kanada literatura antologio	39
Paralela Universo	9	- Kebeko	41
NOREK 2016: Pramŝipe al Esperantujo	13	- Vilanelo: Sterko sur la rozoj	43
Presu viajn informilojn!	17	- Knabo, kiu amis birdojn	45
Eta anonco (denove) pri Meetup provo	18	<b>DIVERSAĴOJ</b>	<b>47</b>
Esperanto-Nov-Skotio ankoraŭ aktivas	19	El Italio, deziras korespondi	47
Bondezirojn al partoprenantoj de ARE	21	Nova kaj plibonigita Lernu.net	48

# Kolumno de la redaktorino

Ekde la pasinta numero de Lumo, multaj esperantaj eventoj okazis! Unue en Nordameriko, esperantistoj renkontiĝis en Granbio dum turisma semajnfino por MeKaRo. Nicolas Viau rakontos kion ili faris; Granbio ofertas multe da agadoj. Sekvos raporto de Douglas Falcao pri sia partopreno dum NASK, kio daŭris dum unu semajno fine de junio en Norda Karolino. Freŝdate, Ardeo Mann biciklis al Anacortes en Vaŝingtonio por partopreni en NOREK. Ankaŭ okazis UK en Slovakio kaj IJK en Pollando; legantoj povos akompani Paul-on Hopkins en Nitro kaj spekti junularan kongreson tra fotoalbumoj el retejo.

Krom ĉiujaraj movadaj kunvenoj, Esperanto invitiĝis en la konversacion okaze de Monda Socia Forumo 2016 en Montrealo, en kiu elstaraj homoj el la tuta mondo traktis grandajn sociajn problemojn kaj defiojn por la estonteco. Tamara Ne Amara prezentos kiel esperantistoj partoprenis en la forumo. Interalie, informiloj pri Esperanto faritaj de Ĵenja Amis estis disdonitaj tie: vi povas eĉ presi ilin.



En la movado mem, Jed Meltzer traktis defion de malfacileco por kunveni tra grandaj distancoj en Nordameriko. Li sukcese elstarigis projekton nomita Paralela Universo por kuraĝigi homojn organizi diversajn lokajn renkontiĝojn la saman tagon, ligitajn kun la aliaj uzante novan teknologion. Parolante pri nova teknologio, ĉu vi rimarkis novan kaj plibonigitan Lernu.net?

Ŝajnas, ke esperantistoj estas tre aktivaj dum somero. Nun, malvarma aŭtuna vetero, reveno al laboro kaj lernejo igas nin sopiri somerajn renkontiĝojn kaj feriojn. Sed kial sopiri? Legu ĉi tie poezion el la Kanada Antologio, kaj ĝuu Legendon de Niagara Akvofalo rakontita per la propraj vortoj de Saĉjko Iŝtok. Provu Meetup kaj partoprenu diversajn lokajn kunvenojn; eĉ prezentu al Lumo vian esperantan grupon, kiel faris Bob Williamson.

Ĵus okazis ARE kaj mi partoprenis,  
do mi antaŭĝojas revidi vin venontfoje!

**Kamila**

[Camille-Amélie Koziej Lévesque]

**Redaktorino**



# KANADAJ NOVAĴOJ



## Esperantistoj — ĉu novaj « bestoj » en Granbio?

Nicolas Viau

Oni povus fojfoje imagi, ke jam okazis [MeKaRo](#) en preskaŭ ĉiuj interesaj urboj de Kebekio kaj Ontario. Sed Granbio nun estas nova centr(et)o de Esperantujo, inter Montrealo kaj Ŝerbruko, ekde la translokiĝo tien de Normando Fleury kaj Zdravka Metz.

Eble nun estas nova oportuno, por ke sekvantaj Mekaroj povu okazi ankaŭ en relative pli malgrandaj urboj. Tamen estis multe por fari en Granbio. Bestĝardeno, naturcentro, pomvinejo (mi partoprenis, kaj estis tre interese — kaj bonguste!) kaj farmbieno estas ĉiuj viziteblaj en proksimaj lokoj.

Sabaton ni marŝadis tra tipa urbo de la Orientaj Kantonoj de Kebekio, kun anglaj komenciĝoj kaj frua arkitekturo, sed nuntempe franclingva plimulto.

Normando kaj Zdravka dankendas pro sia tre afabla gastemo. Sabatvespere ili preparis manĝegon por la tuta partoprenantaro, kaj eĉ gastigis kelkajn (ekzemple mi!), antaŭ tre agraba vespero en la ĝardeno.

Dimanĉon ni pasigis sufiĉe longan tempon en la fama granbia bestĝardeno, eble la plej konata loko en Granbio. Estas en ĝi tre multaj diversaj bestoj... sed tiun tagon ili gastigis novan specion: Esperantistoj! Poste, kelkaj iris al naturcentro, kaj aliaj, inkluzive mi, al pomvinejo, kie ni gustumis tre diversajn pomvinojn!

Tagfine ĉiuj manĝis en restoracio apud lago.

Lundon matene la grupo dividiĝis inter tiuj, kiuj vizitis la Farmbienon Miner, malnovan farmbienon kie oni kreskigas fruktojn kaj legomojn laŭ tradiciaj metodoj, antaŭ promeno tra la bieno. Aliuloj povis iri golfi — flugtelere! Ĉio tio antaŭ kuna manĝo en ĉina bufedrestoracio.


Eĉ aperis artikolo pri Mekaro en loka gazeto (sur la unua paĝo!) semajnon poste. Granbio nun estas parto de Esperantujo!

Rilataj ligiloj — alklaku ĉi tie!

[Artikolo de La Voix de l'Est](#)  
(en la franca lingvo)

Facebooka evento :  
[Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto 2016](#)

Filmeto de Julien Moulin :  
[MeKaRo 2016](#)




## MIA SPERTO DUM NASK DOUGLAS FALCAO

Mi pasigis mian infanaĝon en Sud-Ameriko, kaj tie la plejparto de la homoj scias pri lingvo Esperanto. Tamen, mi devis atendi ĝis la somero 2015 por havi mian unuan sperton kun Esperanto dank' al duolingo.com. Lerni lingvojn estas unu el miaj pasioj kaj, tra miaj spertoj, mi komprenas ke la procedo estas tre malrapida kaj peniga. Aliflanke, lerni Esperanton estis vigliga sperto. La regula gramatiko kaj la simila leksiko permesis al mi konversacii post nur kelkaj semajnoj. Krome, loĝante en multikultura urbo Toronto, mi tre ĝuas paroli neŭtralan lingvon en kiu malgravas etneco.

Mi tre rapide aliĝis al la loka Esperanto-grupo por lerni pli pri la lingvo kaj ekzerci min pri ĝi. Kia surprizo kiam mi malkovris, ke Toronto havas tiel grandan kaj bone establitan esperantan komunumon. Kelkajn semajnojn poste, mi

ricevis retmesaĝon pri intensiva Esperanto-kursaro nomata NASK - Nord-Amerika Somero Kursaro. Ĝi ŝajnis kiel perfekta oportuno por plibonigi mian kapablon pri Esperanto. Do, mi tuj petis stipendion de la Kanada Esperanto-Asocio kaj mi aĉetis mian aviadilan bileton.

Ĉe NASK, studentoj de malsamaj niveloj povas kune loĝi en esperanta komunumo dum ili ĉeestas klasojn. Por fari tion, la NASK-teamo laboras kun sperta grupo de instruistoj kaj instru-helpantoj por provizi tri malsamajn klasojn kaj diversajn aliajn aktivecojn. Krome, ĉi-jare kaj dum la sekvaj jaroj, NASK okazas ĉe William Peace Universitato en Raleigh, Norda Karolino, kie oni havas aliron al la klasĉambroj, dormejoj, manĝejo, konferenc-ĉambroj, teatro kaj al la belaj ĝardenoj.



Tamen, la sukceso de NASK ankaŭ ŝuldas grandan dankon al la partoprenantoj, kiuj estas tre diversaj kaj bonvenigemaj. Kelkaj studentoj estis tre junulaj kaj aliaj estis tre maturaj. Kelkaj estis komencantoj, aliaj parolis Esperanton denaske. Kaj ili devenis de la tuta kontinento. Sed malgraŭ ĉiuj niaj diferencoj, ĉiam estis sento de celebrado kaj unueco en la aero ĉar Esperanto unuigis nin kiel grandegan familion, kunhavigante spertojn kaj disvolviĝante kune en nia esperantista vojaĝo.

Kelkaj el miaj plej ŝatataj momentoj de NASK estis dum la movoplenaj posttagmezoj kaj vesperoj. Ni ĉiam komencis la tagon kun la kursaro, kiun

Sed malgraŭ ĉiuj niaj diferencoj, ĉiam estis sento de celebrado kaj unueco en la aero ĉar Esperanto unuigis nin kiel grandegan familion, kunhavigante spertojn kaj disvolviĝante kune en nia esperantista vojaĝo.

sekvis la tagmanĝo en la manĝejo, kie ni ĝuis longajn konversaciojn. Tamen, post tio, ĉiu tago estis surprizo ĉar la partoprenantoj povis prepari prelegojn aŭ prezentojn por kunhavigi siajn spertojn kaj talentojn. Mi tre ĝuis ĉeesti prelegojn pri diversaj aferoj, ekzemple pri «vivo kun esperantista familio,» «poemoj» kaj «la rolo de Esperanto en la Ruĝa Kruco.» Eĉ pli ekscitema estis simple sidiĝi kaj ĝui esperantajn koncertojn kaj teatraĵojn, kiujn partoprenantoj preparis. Mi estos ĉiam dankema pro la oportuno por organizi la Internacian Muziko-Vesperon, koncerton de horo kaj duono en ses lingvoj kaj multaj pliaj muzikaj stiloj, kie partoprenis la muzikistoj de la grupo.



Unu semajnon poste alvenis la plej malfacila parto de la kursaro: ni devis adiaŭi. Estas interesa kiel tiaj fortaj rilatoj povas estiĝi en tiom mallonga tempo. Devas esti la magio de Esperanto - kunvenigi specialajn personojn. Tamen ni ĉiam havos la telefonon, retmesaĝojn, kaj NASK 2017.



# Kelkaj vortoj pri Monda Socia Forumo

Tamara Anna Koziej (Tamara-ne-amara)

Marŝi ĉiuj por partopreni mondiskalan eventon. Marŝi por esti kune kaj subteni tiujn kiuj marŝas por la socia ŝanĝo. Marŝi por manifesti, ke Esperanto estas ja parto de moderna mondo.



Monda Socia Forumo okazis en Montrealo inter la naŭa kaj dekkvara de aŭgusto. La dekdua forumo, kiu naskiĝis en Suda Ameriko, ankoraŭ neniam okazinta en la «riĉa» okcidenta lando, kolorigis montrealan urban vivon. La celo de la evento, kiu grupigas la plej progresajn civitanajn organizaĵojn, estis pripensi dum diversaj atelieroj pli justan kaj pli feliĉan mondon por ĉiuj Teranoj, sed ankaŭ festi, interkonatiĝi, kaj interŝanĝi kulturajn tradiciojn kaj praktikajn sciojn. Malbonŝance, pluraj afrikanaj aktivuloj ricevis negativan respondon de la kanada registaro rilate al ilia vizpeto! Multo farendas por ke ĉiuj sociaj maljustecoj malaperu...Ĉiuj dokumentoj de la Forumo aperis trilingve: france, angle kaj hispane. Ne eblis por mi ne pensi... «Kial do ne esperante ...?»

# PARALELA UNIVERSO

Jed Meltzer

La 20an de aŭgusto pli ol 220 homoj en kvar landoj de Nord-Ameriko partoprenis 25 malsamajn Esperanto-renkontiĝojn samtempe, kadre de nova eventaro sub la titolo Paralela Universo. La aranĝoj variis laŭ grando kaj komplekseco, de 2 ĝis 28 homoj. Multaj partoprenantoj estis relative novaj, kaj en pluraj eventoj la plejmulto de la ĉeestantaro renkontis aliajn esperantistojn por la unua fojo en la vivo! Tiu ĉi eventaro organiziĝis sufiĉe subite, kun nur 9 semajnoj inter la unua enreta mencio kaj la eventaro mem. Dum la tago, partoprenantoj de diversaj eventoj interkomunikis kaj kunhavigis fotojn kaj videojn de sia agado. Nu, nun vi scias, kio estis Paralela Universo. Mi volas ĉi tie rakonti al vi, kiel kaj kial la afero efektiviĝis.

Nord-Ameriko povas esti malfacila loĝloko por esperantisto. Ni rigardas envie al la bunteco de esperantaj aranĝoj en Eŭropo, kie la multlingveco levas la lingvan

problemon pli alte en la socian konscion. Tie ĉi la distancoj estas longaj kaj, se ne ekzistas forta loka klubo, multaj esperantistoj tre malofte havas la oportunun ĝui la etoson de esperanta aranĝo, aŭ eĉ paroli la lingvon vizaĝ-al-vizaĝe. Aparte lamentinda estas tiu stato, kiam en nia kontinento aperas nova ondo de lernantoj dank' al la furora programaro Duolingo. Pli ol 500 000 homoj nun enregistris sin kiel lernantoj de Esperanto per tiu programaro, kaj 30 homoj finas la bazan kurson ĉiutage. Ĉar la kurso uzas la anglan lingvon, tre granda proporcio da tiuj lernantoj loĝas en Nord-Ameriko.

Do kiel kapti tiun ondon, kaj enkonduki la novulojn en nian komunumon antaŭ ol ili perdos intereson? Tio estis la defio, kiun mi rigardis, kiam oni petis min fariĝi la kunordiganto de junula agado de KEA. La instigo al la kreo de tiu posteno estis mia propono, ke Toronto gastigu IJKon en 2019, se Montrealo gastigos la UKon.

Por fari tion ni devos unue revigligi nian junularan sekcion – la Junularo Esperantista Kanada (JEK)! Mi akceptis la ŝarĝon hezite, ĉar mi ne plu estas junulo, sed ne estis memevidenta kandidato de la ĝusta aĝo, do mi akceptis kun la penso, ke mia unua tasko estus trovi mian posteulon! Do, kiel allogi agemajn junulojn? Aŭ agemigi la jam allogitajn? Ĉar tro malfacilas junigi la jam agemajn allogitajn, tiuj restis la solaj ebloj. Ĉe MeKaRo en Majo 2016 mi multe diskutis la aferon kun miaj geamikoj.

Nu, junuloj lastatempe tre ŝatas teknologion, saĝtelefonojn, sociajn retojn, k.t.p. Tiuj iloj vere kunportis Esperanton al nova generacio, sed multaj el tiu generacio tute maltrafis la spertojn, kiujn ni maljunuloj ĝuis dum niaj fruaj jaroj de esperanta agado. La raraj kaj karaj renkontiĝoj! Multaj el ni memoras, kiel ni ŝoforis horojn por ĉeesti renkontiĝon, aŭ flugis al alia lando, aŭ eĉ telefonis al nekonatulo, simple ĉar tiu enlistiĝas en la membrolisto de nia landa asocio kaj loĝas ne tro for. Kiel rekapti tiun sperton por la

aktuala junularo? Ĉu vere estas fendo inter la malnova versio de Esperantujo kaj la nova interreta versio? Aŭ ĉu povas ekzisti ponto inter la du mondoj? Dum MeKaRo ni pasigis kelkajn horojn piedirante tra la urbo Granbio serĉante “portalojn” por la ludo Ingress, pri kiu unu amikino estas entuziasmulo. (Ĝi similas al Pokémon Go, kiu tiam ankoraŭ ne estis aperinta). Ŝi parolis multe pri kiel la saĝtelefona teknologio havis la efikon instigi homojn iri eksteren kaj vidi la veran mondon, kaj renkonti homojn vizaĝ-al-vizaĝe. Mi miris kiom multe ni malkovris pri la urbo Granbio kaj pri la fizika mondo ĉirkaŭ ni, helpate de tiuj iloj, ne flankdistrite de ili, kiel mi antaŭsupozis.

Tiel ekflamis la ideo. Ni povus uzi la povon de la nova teknologio por instigi homojn renkonti aliajn homojn en la vera mondo. La ideo pli kaj pli firmiĝis. Ni havos plurajn eventojn la saman tagon. Ĉiun eventon organizos lokano, kaj ni klopodos provizi simplan ŝablonon por la eventoj.

Ni decidis, ke 4 horoj estus la ideala maksimuma vojaĝo-distanco. Tiel oni povus vojaĝi matene, komenci je tagmezo, kaj fini je 20:00 kaj ankoraŭ reiri hejmen sen bezono tranokti. Ni sugestis, ke evento inkluzivu tagmanĝon kaj vespermanĝon, kun aliaj agadoj intertempe. Ni emfazis, ke fakte estas tre facile organizi eventon – nur sugestu restoraciojn por la du manĝoj, kaj agadon inter la du. La agadoj estis kutimaj por Esperanto-aranĝoj – muzeoj, naturpromenadoj, keglo-ludado, serĉludoj, k.t.p. Kelkaj eventoj estis tre detale organizitaj, kaj kelkaj estis neformalaj kaj malpli longaj ol la sugestita 8 horoj. Do ŝajne la ŝablono estas sufiĉe fleksebla por taŭgi por la diversaj bezonoj de eventoj en diversaj lokoj.

Komencite, la afero rapide kreskis. Ni volis uzi jam pretan teknologion, ĉar mankis tempo kaj sperto por krei novajn ilojn. Tial ni ĉefe uzis Google-grupon kaj Facebook-on. Plej grava estis la mapo farita per Google Maps, per kiu ni povis montri la lokojn de la proponitaj eventoj kun ligiloj al la diskutfadenoj.

Por komuniki dum la eventoj mem, ni elektis la programon Telegram – rapida mesaĝilo, kiu funkcias per saĝtelefonoj kaj komputiloj, kaj per kiu oni povas facile kunhavigi fotojn, videojn, geografiajn lokojn, k.t.p.

Kompreneble, ne ĉio iris perfekte. Okazis problemoj pro trafiko, pluvo, varmece, kiuj malhelpis kelkajn partoprenantojn. Sed finfine la eventaro estis pli sukcesa ol ni atendis. El 28 anoncitaj eventoj, 25 vere okazis, kaj kelkaj el la eventoj estis mirige grandaj, inkluzive de novaj vizaĝoj kaj malnovaj ne vidataj dumlonge. Spertuloj multe komentis pri la surprize alta parolkapablo de la novuloj, kiu evidencigas kaj la facilecon de nia lingvo kaj la efikecon de novaj lern-rimedo. Mi aparte ŝatas la rakonton pri la plej malgranda evento, kiu estis por la organizanto la unua fojo paroli Esperanton kun alia homo – kaj tiu alia homo eklernis ĝin antaŭ 51 jaroj.

Tio estas precize la sperto, kiun ni celis krei per Paralela Universo. Ni esperas, ke tiu ĉi eventaro povos esti unu plia ilo en nia il-skatolo por vigligi la esperantan movadon en Nord-Ameriko kaj pretere. Venontjare ni klopodos kreskigi la eventon ankaŭ en Sud-Ameriko, kaj eventuale en aliaj kontinentoj, se estas intereso. Mi esperas vidi vin ĉe Paralela Universo 2017!

Fotoj, videoj, kaj komentoj pri la eventaro troviĝas en la [Facebook-](#) kaj la Telegram-grupoj. Ĉiuj ligiloj troviĝas ĉe [paralelauniverso.com](http://paralelauniverso.com).



## Partoprenantoj laŭ lando kaj grando

**Kanado:** Toronto ON (11), Montréal QC (8), Victoria BC (5), Saguenay QC (4), London ON (4)

**Usono:** San Francisco CA (28), Washington DC (21), Austin TX (15), Mount Laurel NJ (15), New York NY (13), Watkins Glen NY (12), Kansas City MO (8), Seattle WA (8), Boston MA (8), San Diego CA (7), Atlanta GA (6), Chicago IL (5), Raleigh NC (4), Phoenix AZ (4), Pompano Beach FL (3), Cincinnati OH (2)

**Kubo:** La Habana (19), Viñales, Pinar del Río (3)

**Meksiko:** Santiago de Querétaro (14)  
Kaj surmare sur la krozŝipo Celebrity Solstice (3, Esperantista familio)

**Sume:** 230

# NOREK 2016:

## PRAMŜIPE AL ESPERANTUJO

Ardeo Mann

Estas la plenplena sento kiun mi havis dum NOREK kiu vere restas kun mi nun.

Vendredon je posttagmezo ni alvenis al Anacortes, kie okazis la ĉi-jara Nord-Okcident-Regiona Esperanto-Konferenco. Mi kaj Lottie Ericson foriris de Viktorio kaj veturis bicikle, buse kaj pramŝipe ĝis nia bona sed malmultekosta motelo en la malnova urbocentro de Anacortes, Vaŝingtonio. Post eta paŭzo, ni biciklis al la kongresa hotelo.

Estis tie, sidante en la kongresejo, kie iom post iom amikoj komencis alveni. Mi bonŝancas loĝi en Viktorio, kie estas sufiĉe multe da esperantistoj, sed neniu vere de mia aĝo. Do estas ĉe NOREK ĉiujare kie mi vidas denove la aliajn gejunulojn el la regiono. Kelkajn mi ekkonis dum NASK kaj la Landaj Kongresoj en Viktorio antaŭ du jaroj, kaj aliajn dum pasintjaraj NOREKoj.

Vendredo-vesperon estis nebulaĵo de ĉirkaŭpremadoj, amuzaj ludoj kaj bongustaj manĝaĵoj. Ni ridis kaj ĝuis la etoson. Poste ni picumis kaj mi biciklis hejmen por dormi antaŭ la longa sabato de NOREK.

Sabaton, mi ekvekiĝis je la 5.30 atm, preta por bonega tago. Pluvis, kiel kutima septembra tago en la regiono, do Lottie kaj mi foriris por havi malsekan biciklan aventuron al la kongresejo. De tie, ni iris aŭte al la pramŝiphaveno (denove!) kaj, postnelonge, ni estis survoje al Vendreda Haveno ĉe la insulo San Juan. Mi konas tre bone la kanadajn insulojn de tia insularo, sed mi neniam antaŭe vizitis iliajn usonajn duplikatojn. Pramŝipe ni ludis la amuzan ludon de Kodnomoj, ĝis ni alvenis al haveno. Ni elŝipiĝis kaj komencis esplori la urbeton. La gejunularo vizitis la plej gravajn ejojn en la urbeto: la librovendejo kaj la ludejo. Ĉiuj puŝis min ĉe la pendolo kaj ni elkovris la kialon por esti esperantistoj kaj ne korbopilkadistoj. Ni ankaŭ tagmanĝis ĉe Taja restoracio kaj vizitis la terkultivistan bazaron.



Vendreda Haveno  
Foto: Lottie Ericson



Posttagmeze, ni revenis al Anacortes (en alia pramŝipo!) kaj babilis trankvile dum kelkaj horoj. Je la 6a, la kongresa programo komenciĝis denove kaj ni picumis kaj aŭskultis prelegojn ĝis la 9a. Kutime NOREK estas nur 2 tagoj de tedaj prelegoj, do estis vere bela havi tagon por ekskursoj kaj nur kelkaj prelegoj vespere. Kaj la prelegoj estis vere interesaj! Mi eklernis pri la morfologio de Esperanto kaj ĝia rilato al tradukado kaj vojaĝoj al Eŭropa Esperantujo, Nordkanado kaj Skotlando.

Estis tiam, kiam mia plej ŝatata tempo de la semajnfino komenciĝis. Ni sidis kune kaj parolis dum horoj. Ni kantis la kantojn de Persone kaj La Perdita Generacio. Ni parolis pri niaj vivoj ene kaj ekstere de Esperantujo. Ni ridis. Kaj ni kreis tian etoson kiu nur ekzistas je noktomezo inter esperantistoj. Tia plena sento de komunumo kaj interkomprenado kaj amikeco.



Ni ludas Kodnomojn pramŝipe  
Foto: Lottie Ericson



La gejunularo pramŝipe denove  
Foto: Lottie Ericson

Finfine estis la horo por adiaŭi. La 3 kanadanoj devis foriri frumatene pro la pramŝipa horaro, do mi brakumis miajn amikojn kaj biciklis al motelo por dormi iomete antaŭ la vojaĝo hejmen.

Estis belega semajnfino, kaj mi volas danki al KEA pro la stipendio kiu helpis min partopreni. Mi esperas, ke NOREK estis nur mia komenco de mirinda jaro en Esperantujo kun bonegaj amikoj, amuzaj aventuroj kaj interesaj ideoj.



Vendreda Haveno  
Foto: Ben Speakmon

# Presu viajn informilojn!

## Ĵenja Amis

En Esperanto-Societo Kebekia kaj Kanada Esperanto-Asocio ni jam delonge pensis fari novajn informilojn pri Esperanto, kaj en la preparoj por la Monda Socia Forumo en Montrealo ĉi-jare ni dezajnis tre belajn kalendaretojn kaj paĝ-indikilojn por reklami Esperanton kaj niajn asociojn. Antaŭ ĉio, ni volis fari utilajn reklam-materialojn, kiujn homoj volus teni, malsimile al la kutimaj informiloj, kiuj ofte finas sian vivon en rubujo post nur kelkaj sekundoj da rigardo. Mi ĉiam admiris la reklam-materialojn de Esperanto-France, kaj mi aparte ŝatis iliajn ĉiujarajn poŝkalendaretojn kun bazaj informoj pri Esperanto, kaj ni volis fari ion similan. La esperantistoj el Francio bonkore permesis al ni uzi ilian dezajnon, sed ni finfine decidis fari ĝin ĉe ni pro la malsama grandeco de papero, kaj ni ankaŭ volis meti aliajn informojn kaj frazojn



taŭgajn por la nord-amerika kunteksto. Do, post longa laboro, ni presigis belegajn kalendaretojn por 2017 en du lingvoj: la angla kaj la franca. La materialoj estis tiom sukcesaj, ke la franca versio de la kalendaretoj rapide elĉerpiĝis. Pluraj amikoj el Usono kaj Kanado petis la dezajnon por ke oni povu printi por sia klubo, kaj mi dividis ĝin jam kun pluraj homoj, sed mi pensis, ke verŝajne estas

pluraj aliaj, kiuj ŝatus uzi ilin. Do, mi metis la pres-pretan dezajnon en la reton, tiel ke ĉiuj, kiuj volas, povu printi ilin. Oni povas printi la kalendaretojn tre malmultekoste ĉe VistaPrint aŭ kiu ajn alia presejo, kiu faras faldeblajn vizitkartojn

(oni simple alŝutu la dezajnon en ilian retejon, elektu paperkvaliton kaj la preskvanton, kaj oni ricevos la presaĵojn post kelkaj tagoj per la poŝto). [Aliru la dosierojn, mendu kalendaretojn ĉe VistaPrint](#), presu viajn informilojn!

## Eta anonco (denove) pri Meetup Provo

Dum la aŭtuno de 2016, vi kaj via klubo provu la retejon Meetup senpage dum tri monatoj! Fine de la senpage provperiodo KEA decidis, ĉu ni daŭre uzos la servon Meetup Pro kaj rekte pagos la koston de Meetup por la kluboj.

La misio de Meetup estas revigligi lokajn komunumojn, kaj helpi homojn tra la mondo mem-organizi. Ĝi estas efikega maniero organizi, reklami, kaj trakti renkontiĝojn, kaj ĝi povas rapide kaj facile disvastigi la scion pri viaj renkontiĝoj al dekoj da diversaj homoj, kiuj interesiĝas pri nia lingvo!

Kelkaj el la kluboj jam uzas Meetup-on:

- **Esperanto-Peterborough**
- **Esperanto-Toronto**
- **Esperanto-Hamilton**
- **Esperanto-Kitchener-Waterloo**
- **Vancouver Esperanto Group**

Iuj el ĉi tiuj kluboj estiĝis plejparte per Meetup.

Por plia informo, ret-mesaĝu la sekretarion de KEA, Mateo Chisholm, ĉe [mateo416@gmail.com](mailto:mateo416@gmail.com)



# ESPERANTO-NOV-SKOTIO ANKORAŬ AKTIVAS

Bob Williamson

Dum la pasinta jaro, la esperantista rondeto de Nov-Skotio malmulte aktivis kunnekonatoj. Depost 2013 ni ne partoprenis la ĉiu-jare septembran librofoiron «Vorto ĉe la Strato» en Halifakso, ĉar la rezultoj neniam valoris la grandan aliĝ-kotizon. Dum almenaŭ dek jaroj ĉe tiu librofoiro ni allogis neniujn novajn grupanojn. Pro tio, la grupeto malmulte kreskis. Pasintjare mortis nia plej maljuna grupanino, Kim Keeble. Poste restis nur kvar grupanoj en Halifakso, du en Berviko, kaj unu en pli norda loko. Daŭre Kate portas la atentokaptan butonon, heredita de Kim, kiu diras «Ho Ve!»

Tamen, ni ankoraŭ aktivas inter ni. Ĉiun duan aŭ trian dimanĉon, ni kunvenas en hejmo de grupano por du-hora babilado pri diversaj temoj (vidu [esperanto.ca/eo/halifax](http://esperanto.ca/eo/halifax)).

Kutime ni kunvenas en la halifaksa regiono, sed ankaŭ fojfoje en Berviko. Ni preskaŭ neniam krokodilas. Nur lastatempe ni parolis la anglan kiam unuafoje ĉeestis nekonata interesito, pol-devena kuracisto. Ni esperas, ke ŝi decidos eklerni la lingvon aŭ nun aŭ post la emeritiĝo. Antaŭ unu jaro ĉeestis por la unua fojo loka, alt-lerneja junulo kiu mirinde bone eklernis la lingvon pere de [duolingo.org](http://duolingo.org). Post eklerno de Esperanto, li ekstudis la polan lingvon kaj jam nun loĝas en Pollando, kie li ĉeestas liceon. Ni esperas, ke post jaro Peter revenos al ni.

Ne nur loke, sed ankaŭ kun eksterlando ni agadas. Reni daŭre ĉeestas retajn kunvenojn en la mondo de «Dua Vivo», kie li ĉiu-semajne komunikas kun diverslokaj eksterlandanoj. Bob ankoraŭ ŝatas aŭskulti podkastojn de [pola-retradio.org](http://pola-retradio.org). Aŭguston 2016, John kaj sia 9-jaraĝa filino Samantha vizitis Japanion. Ili renkontis karan amikino de nia grupo, Chizuko, kiu gvidis ilin tra Kioto kaj al natur-parko en Nara, kie Samantha multe ĝuis manĝigi la cervojn. Ili ankaŭ vizitis la Japanan Esperanto-Instituton (JEI) en Tokio kaj ricevis informon pri la urbo.

Lastatempe, nek eksterlandanoj nek kanadanoj de aliaj regionoj vizitis nin. Tamen, ni ĉiam pretas bonvenigi esperantistojn aŭ komencantojn aŭ scivolemulojn al niaj kunvenoj. Se vi vizitos Halifakson, nepre kontaktu nin.



En Kioto, japana amikino NISHI Chizuko kun kanadano John HUANG kun sia filino Samantha



# BONDEZIROJN AL PARTOPRENANTOJ DE ARE

Ĵus okazis la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE) en Silver Bay, kiu situas apud lago en tre bela montara regiono en la usona ŝtato de Novjorkio. Ĉi-jare dum Dank-Festo en Kanado kaj Kolumbo-Festo en Usono kuniĝis esperantistoj el nordorienta Ameriko en ege amika etoso.

Saluton al ĉiuj; dankon por la renkontiĝo!

Kamila kaj Nicolas Viau, kiuj ricevis subtenon de KEA, komentis la semajnfinojn en venonta numero de Lumo.



# RAPORTOJ KAJ KONTRIBUAĴOJ

## NI SPERTIS LA 101-AN UNIVERSALAN KONGRESON DE ESPERANTO

**Paul Hopkins**


Ĉi-somere mia edzino Maria kaj mi partoprenis la 101-an Universalan Kongreson de Esperanto en Nitro, Slovakio. Ni ekkonis nin dum alia UK, la plej granda ĝis nun, kiu okazis en Varsovio (Pollando) en la jaro 1987 okaze de la centa datreveno de la publikigo de la Unua Libro; tiun

kongreson partoprenis pli ol ses mil esperantistoj (5946 oficiale). Meze inter 1987 kaj ĉi tiu jaro ni kune partoprenis ankaŭ duan UK-on, la 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo (Kroatio), kiun ni partoprenis kune kun 1689 aliaj esperantistoj.



El ĉi tiuj tri Universalaj Kongresoj, hazarde ĉiuj en slavaj landoj, la ĉi-jara estis la plej malgranda, kun 1253 partoprenantoj, sed ĝi ne postrestis la aliajn laŭ kvalito de organizado aŭ ĝindeco. Iusence ĝi estis pli bona, ĉar okazigante la kongreson ne en la ĉefurbo sed en meze granda urbo – Nitra estas la trie plej granda urbo de Slovakio kiam studentoj estas en la urbo kaj la sese plej granda urbo de Slovakio kiam la studentoj ferias – la slovakaj esperantistoj sukcesis vere kapti la atenton de la urbaj instancoj kaj havigi al si la kunlaboron de lokaj komercistoj. Sekve Esperanto manifestiĝis ne nur en la kongresejo sed tra la tuta urbo, tiel ke kongresanoj povis vere senti ke ili vivas en Esperantujo dum semajno.

Por plene ĝui la kongreson ekde la komenco, Maria kaj mi forvojaĝis de nia hejmo en Kalgario (Alberto) jam tri tagojn antaŭ la unua kongresa tago. Alteriĝinte en Vieno, ĉe la internacia flughaveno plej proksima al Nitro, ni restis du tagojn en la aŭstra ĉefurbo kaj tie ripoze vizitis la vidindaĵojn. Por esperantistoj nepre vizitinda estas la Esperantomuzeo, eksponejo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kie ni havis la bonŝancon ekkoni la teamestron Bernhard Tuidler.



Kiel li klarigis al ni, la Esperantomuzeon kaj la Kolekton por Planlingvoj prizorgas teamo de profesiaj bibliotekistoj, kies laboron konsistigas ne nur la konservado kaj priskribado de ĉi grandega kolekto de libroj, revuoj kaj aliaj dokumentoj kiuj rilatas Esperanton kaj aliajn planlingvojn sed ankaŭ la disponigo de la kolektitaj libroj kaj revuoj al la publiko per interreto. Dank' al tio, multaj libroj verkitaj esperante kaj multaj Esperanto-revuoj estas jam legeblaj interrete.



Maria ĉe la enirejo de la Esperantomuzeo kaj la Globo-muzeo

La 21-an de julio ni vojaĝis per buso de la Viena flughaveno rekte al busa stacidomo de Nitro, de kie buseto portis nin al nia kongresejo ĉe la Slovaka Agrokultura Universitato. Tie ni ricevis niajn dokumentojn kaj poste promenis tra la universitata kampuso al la studenta hotelo kie ni enloĝiĝis. Vespere mi partoprenis la Movadan Foiron antaŭ la kongresejo, kie mi povis prezenti la agadon kaj servojn de Kanada Esperanto-Asocio; mia samtablano estis la reprezentanto de Esperanto USA, Vilĉjo Harris.



LLZ invite staras ĉe  
la enirejo al la kongresejo

Matene de la 22-a de julio okazis la Solena Inaŭguro, dum kiu la kongreso oficiale komenciĝis en la Sporta Halo de Nitro. La ĉeestantaro impone plenigis la halon, la nove elektita estraro de UEA digne sidis ĉe longa tablo sur la scenejo sub granda ekrano kie videofilme prezentiĝis grandskale la okazaĵoj. Nia samlandano Mark Fettes, nove reelektita prezidanto de UEA, gvidis la ceremonion, dum kiu prezentiĝis diplomatoj, festparolis gravuloj – inter ili la urbestro de Nitro, kiu esperante (!) bonvenigis la kongresanojn en sia urbo – kaj salutis la kongreson reprezentantoj de ĉiuj landoj. Nome de nia lando salutis tiu, kiu ekde ĉi tiu jaro reprezentas Kanadon en la Komitato de UEA: Guy Matte.



Parto de la ĉeestantaro de la Solena Inaŭguro



Estraranoj de UEA sursceneje sidas antaŭ la esperanta popolo

Post la Solena Inaŭguro komencis la tumulto de programeroj kiu karakterizas ĉiun Universalan Kongreson: fakkunsidoj, prelegoj pri la kongresa lando, prelegoj de la



Guy Matte salutas  
la Universalan Kongreson

Internacia Kongresa Universitato, prelegoj de la Esperantologia Konferenco, prelegoj pri la kongresa temo, paroligaj kursoj, lingvaj ekzamenoj, kurso pri la slovaka lingvo, kurso pri la ĉeĥa lingvo, teatraĵoj, koncertoj, korus-ekzercado, ekumena diservo. Ofte okazis tri, kvar aŭ eĉ kvin programeroj samtempe, tiel ke foje malfacilis decidi, kiun programeron sekvi. Aŭ se oni volis sekvi neniun programeron, eblis pasigi horojn feliĉajn sed por la monujo danĝerajn en la Libroservo, babilo en la universitata kafejo, kafumi sub libera ĉielo ĉe la budo de medofabrikisto Tomsk inter la universitataj konstruaĵoj, aŭ partopreni ekskurson.

Ni kanadanoj kutime devas longdistance vojaĝi por atingi Universalan Kongreson, kaj do la scivolemuloj inter ni ĉiam uzas la kongres-partoprenadon kiel pretekston por lerni pri la kulturo, historio kaj geografio de la vizitata lando. Por tio bone servas la ekskursoj. Dum la kongresa semajno Maria kaj mi partoprenis ekskursojn de kvar specoj. Unue, ni en la dimanĉa verspero partoprenis piediran urborigardadon. Profesia gvidisto kaj sperta tradukistino gvidis nin unue al la medomuzeo kaj medokelo de sinjoro Tomsk, kiu ankaŭ gustume instruis pri la kvalitoj kaj produktado de medo (miel-vino). Tiel fortiginte nin, niaj gvidantoj kondukis nin al unu kastelo post la alia, laŭ mont(et)oj kaj valoj, dum du plenaj horoj, ĝis kiam ni finfine venis al la urbcentra

placo, kie la kongres-organizintoj okazigis buntan kultur-spektaklon por esperantistoj kaj urbanoj (la Nacia Vespero). La sekvan tagon matene okazis ekskurso kiu celis montri al ni la malnovajn kristanajn kultur-radikojn de Nitro, kiu en la 9-a jarcento estis la ĉefurbo de Granda Moravio. Ĉi-foje gvidisto kondukis nin al monteto apud Nitro, sur kies supro troviĝis la ruinoj de preĝejo konstruita antaŭ mil jaroj, kaj al la ruinoj de monaĥejo el la malfrua mezepoko.



la preĝejo de sankta Mikaelo la Ĉefanĝelo  
kun vizitantaj esperantistoj

Posttagmeze de tiu tago ni partoprenis pli ripozigan ekskurson, al ThermalPark Nitrava en la kamparo sude de Nitro, kie ni povis nin bani dum du horoj en sep varmakvaj basenoj. Dum la merkredo, kiam preskaŭ ĉiuj kongresanoj partoprenis tut-tagan ekskurson, ni decidis viziti ne la ĉefurbon Bratislava nek la Vinan vojon de la Malgrandaj Karpatoj, nek la faman banejon Piešťany sed la mezepokan ĉefurbon de Hungario, Esztergom, kun lunĉo kaj vinkela vizitado posttagmeze en Château Béla, historia palaceto de sud-okcidenta Slovakio nun uzata kiel kvin-stela hotelo.

Laŭdire la Solena Fermo en sabato, la 30-a de julio, estis kortuŝe impona, sed por kapti la okazon traveturi Pollandon al nia sekva celo kun malnovaj geamikoj, Maria kaj mi devis forveturi de Nitro frumatene. Sed pri tio estas alia rakonto...



esperantistinoj sidas danub-borde antaŭ la katedralo de Esztergom

# IJK 2016 en Vroclavo: reta foto-albumo

Oni diras ke, fojfoje, bildoj esprimas pli bone ol vortoj. Ĉiukaze, nur per fotoj oni bone komprenas, ke ege sukcesis Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Vroclavo, Pollando pasintan someron! Esperantistaj junuloj kuniĝis denove kaj diskutis temon de interreta agado (aktivado), interŝanĝis scipovojn, babilis kaj amuziĝis multe.

Sur retejoj, eblis (kaj ankoraŭ eblas) sekvi la tutan vroclavan kongreson alklakatante **#IJK2016** kaj **#aktivado**, kaj ankaŭ ĉe [la evento en Facebook](#).





Malsolena malfermo



Malsolena malfermo



Gufujo



Internacia vespero



# INTERNACIA VESPERO *jaŭde*

momo	kontribuo	longeco
maria G Pined	Lara Nacis - kanto & muzikaj kantaĵoj	3 minutoj 5 min (se ankoraŭ)
La Voj	Mano kuruzo	3 min?
Bayard	buskangafo	~ 4 min
Olivero	hokuloj (3-4) la Daplo (la kanto) (15 min)	~ 15 min
Ullrich	kontraŭ vido - Tom LaPinto	3-4 minutoj
Sara	Muzikoj kongresoj (popolmuziko)	5 min (?)
J. de C. (KTP)	Soprenda prezentado (kanto) (15 min)	5 min
J. de C. (KTP)	Interkonversio (15 min)	7 min
Thomas Korte	Plurilingva por multlingva famulo	5

Internacia vespero



Trejnado



Trejnado






# LEGENDO DE NIAGARA AKVOFALO

## KIAL KANADA AKVOFALO HAVAS HUFFERAN FORMON

Rakonto : **Saĉjko Iŝtok**  
Rakontita per siaj propraj vortoj.

Longe, longe antaŭe, ĉe proksimeco de Niagaraj Akvofaloj estis loĝanta indiĝena tribo, kiu amis pacon. La tribo nomiĝis Neŭtrularo.

Neniu memoras kiam, sed iam komencis katastrofo; tribanoj subite malsaniĝis sen kialo kaj rapide mortis. Kaj iliaj tomboj estis perfortitaj kaj kadavroj forŝtelitaj. Tiutempe ĉiujare la tribanoj oferis ĉasaĵojn, legomojn kaj fruktojn al tondrodio Hinum, kiu loĝis en la kanada akvofalo kun siaj du filoj. La tribanoj pensis, ke la tondrodio ne estis kontenta kun ilia oferaĵo. Pro tio, la dio okazigis tian katastrofon. Do ili decidis oferi belulinon al li. Ili elektis plej belan junulinon de la tribo ĉiujare, sed vane. La katastrofo daŭris.



Huffera akvofalo

Iun jaron Lelawala, filino de tribestro estis elektita kiel plej bela junulino, kaj oni preparis ŝin por la vojaĝo. Dum tiu tuta tempo la tribestro kviete rigardis sian filinon preparatan. Kaj kiam ŝia kanuo kun oferaĵoj malaperis tra la akvofalo, li ankaŭ sekvis ŝin per sia kanuo, kaj neniu vidis ilin denove.


La legendo ne finis ĉi-tie.

Onidire, dum falado al baseno sub la akvofalo Lelawala estis kaptita en brakoj de du filoj de Hinum, la tondrodio. Ili ja sciis, ke ŝi estis venanta. Ili ambaŭ estis enamiĝintaj al Lelawala.

Lelawala, la princino de la tribo estis ne nur bela sed saĝa kaj firme estis decidinta por servi sian popolon.



Kanada akvofalo matene




Kanada akvofalo tage

Ŝi diris al la fratoj, "Mi akceptus iun el vi, kiu sciigus al mi kialon de la katastrofo de mia tribo, kaj se mi povus hejmeniri unu fojon por sciigi tion al ili."  
La fratoj ambaŭ jam ĵuris, ke neniam al neniu ili dirus la sekreton, do ili devis batali kun siaj konsciencoj.

Finfine la pli juna frato ne povis plu teni sekreton. Li rakontis al Lelawala pri giganta akvoserpento, kiu kuŝis en riverfundo.

"La giganta akvoserpento malsatiĝas unu fojon jare, kaj kiam malsata ĝi iras al tribejo dum nokto, kaj metas venenon en trink-akvon. Homoj kiuj trinkas la akvon mortas. Poste akvoserpentego perfortas ilian tombon kaj manĝas kadavron."

Lelawala estis permesita hejmeniri en spirita formo, kaj sciigis al tribanoj kiel mortigi la serpentegon. Unue trinku akvon nur el fonto, kaj kiam la serpentego aperas, ataku ĝin per armiloj, kiujn ajn ili havas; harpuneto, sago, hakilo kaj tiel plu. Tribanoj agis kiel Lelawala diris al ili.



Kanada akvofalo kun turistoj

La vundita akvoserpentego forkuris al la rivero, sed ĝi kroĉiĝis al rando de la akvofalo, kaj ne povis eskapi en fundon de la rivero.

La Manitou, indiĝena spirito, tiam helpis la tribanojn, kaj fiksas ĝiajn kapon kaj voston per rokoj al ambaŭ randoj de la akvofalo. La akvoserpentego baraktis vane kaj mortis forminte ĝian korpon kiel arko. Tiel la kanada akvofalo fariĝis arko-forma, kiel huffero.



Kanada akvofalo (huffera)

\*Noto: Tiu ĉi rakonto estas rakontita al turistoj, sed indiĝenaj homoj ne ŝatas ĝin, ĉar ili scias, ke ili ne estas tiel kruelaj por oferi belan junulinon ĉiujare al la Dio.



# Kanada Literatura Antologio

La Viktoria Esperanto-klubo havas projekton kompili Kanadan literaturan antologion. Ni proponas, ke oni tradukos kvaronon de la tekstoj el la franca, kaj la cetero el la angla aŭ aliaj lingvoj. Indiĝenaj historioj ankaŭ gravas. Ĉiuj tekstoj devas esti verkitaj de kanadaj verkistoj aŭ okazi en Kanado.

Ni skribos al la tenantoj de kopirajto por obteni permesojn traduki iliajn verkojn. Ni esperas, ke estos malfacila procezo sed ne malebla; post ĉio, ni esperantigos nur mallongajn partojn de pli grandaj libroj, kaj ni diskonigos la verkistojn al esperantistaj legantoj, kiuj neniam legis la rakontojn kaj poemojn en la franca kaj la angla originaloj.

Mi esperantigis kelkajn poemojn kaj duonon de unu eseo, kaj mi esperas ke aliaj esperantistoj povas legi kaj kritiki la tradukojn. Se vi trovis erarojn, mi petas, ke vi sendu ilin al mi. Mi ankaŭ serĉas kunlaborantojn, provlegantojn kaj kontrolantojn. Dankon por via atento kaj helpo.

Jen kelkaj anglaj verketoj, kiujn mi esperantigis.

**Eriko Pedersen**

[antologio@shaw.ca](mailto:antologio@shaw.ca)


2039 Gourman Place, Victoria, B.C., Canada V9B 6A9

[Blogo de la Kanada Antologio](#)

## John McCrae (1872–1918)

Poeto, kuracisto, verkisto, artisto, soldato kaj kirurgo, naskiĝis en Guelph, Ontario. Jam eldoninte novelojn kaj poemojn en pluraj revuoj, li mallonge laboris en la Malsanulejo de Universitato Johns Hopkins kun Sir William Osler, sed volontule aliĝis al la kanada soldataro en du militoj kontraŭ la Buroj en Sud-Afriko. Post la unua, li ekloĝis al Montrealo kie li praktikis medicinon kaj kunverkis lernolibron pri patologio (1912). Kiam la unua mondmilito komenciĝis, McCrae aliĝis al la kanada batalartilerio, kaj oni sendis lin al Flandrio en aprilo 1915. Li verkis «In Flanders Fields» ('En Flandrokampoj') en majo 1915 kaj sufiĉe rapide famiĝis pro tiu poemo. Dum la postaj du kaj duona jaroj li flegis vunditojn kaj rangaltiĝis sed, fine de januaro 1918, li mortis pro pneŭmonio. La poemoj de John McCrae postmorte kolektiĝis kaj eldoniĝis kiel *In Flanders Fields and Other Poems* (1919).





## John McCrae (1908)

### Québec

Of old, like Helen, guerdon of the strong --  
Like Helen fair, like Helen light of word, --  
«The spoils unto the conquerors belong.  
Who winneth me must win me by the sword.»

Grown old, like Helen, once the jealous prize  
That strong men battled for in savage hate,  
Can she look forth with unregretful eyes,  
Where sleep Montcalm and Wolfe beside her gate?

### Kebeko


De antikvo, rekompens' de forteguloj --  
kiel Helena belega, vortleĝera, --  
"Al la venkinto apartenas trofeoj;  
kiu gajnos min, per la glavo min gajnu."

Nun antikva, la premio enviinda  
por kiu homoj malamike batalis,  
ĉu ŝi povas elrigardi malbedaŭre  
kien kaj Montcalm kaj Wolfe apude dormas?

Piednoto: La du generaloj, James Wolfe de Britio kaj Louis-Joseph de Montcalm de Francio, sentime batalis unu la alian. Wolfe kaj liaj soldatoj supreniris klifon de 200 metroj kaj kaptis Kebekurbon, sed ambaŭ el ili mortis dum la Batalo de la Ebenajtoj de Abrahamo en 1759.

# Frederick Cogswell (1917–2004)

Poeto, profesoro, redaktoro, eldonisto kaj literatura kritikisto, naskiĝis en Nov-Brunsviko. Post la dua mondmilito en Skotlando, Fred gajnis magistran kaj doktoran diplomojn, kaj ekde 1952 ĝis 1983 deĵoris kiel profesoro pri la angla lingvo ĉe la Universitato de Nov-Brunsviko. Li estis por tempo la provinca sekretario de la socialdemokrata partio, la CCF, kaj profunde kredis en la malobstrukca imagopovo de la homaro. Li publikigis 42 librojn de sia poezio kaj senlace laboris por plibonigi la pozicion de la franca lingvo en Nov-Brunsviko. Li aktive nutris la kreeman impulson de aliaj kanadaj verkistoj, direktante la eldonon de pli ol 300 el iliaj libroj. Fred Cogswell dufoje ricevis la Bliss Carman–Premion en Poezio, kaj en 1981 li ricevis la Ordenon de Kanado. Li mortis en Vankuvero.



# Frederick Cogswell (1983)

## Villanelle: Dung on the roses

Life has a use for evil in its flow,  
combining opposites while atoms run.  
Dung on the roses makes the roses grow.

From rank effluvia, gross roots and low  
suck at the soil until their thirst is gone.  
Life has a use for evil in its flow;

It turns destroying flame to warm hearth-glow,  
making a second day when day is done.  
Dung on the roses makes the roses grow.

## Vilanelo: Sterko sur la rozoj

La vivofluo povas utiligi fiaĵon,  
Kunigante malojn dum la atomoj kvantumas.  
La sterko sur la rozoj igas kreski la rozon.

La grundo suĉigas ĉiun malnoblan radikon  
Ĝis sensoifo, kie fetoraĵoj elfluas.  
La vivofluo povas utiligi fiaĵon;

Al kamenbruleto ĝi ŝanĝas detruan flamon,  
Kreante duan tagon kiam tag' plenumiĝas.  
La sterko sur la rozoj igas kreski la rozon.



Great blooms will die and rot as, feeding, go  
small flies with wings like lifespans finely spun.  
Life has a use for evil in its flow;

Its seas sustain the cells that pulse below;  
ours live because its dark dilutes the sun;  
Dung on the roses makes the roses grow.


This is What's truth whose Why we do not  
know,  
the riddle of the multiforming One:  
Life has a use for evil in its flow;  
Dung on the roses makes the roses grow.

Florejoj mortos, putros kaj nutros la  
kularon,  
kies aloj vivdaŭretojn subtile ŝpinumas.  
La vivofluo povas utiligi fiaĵon;

Ĝiaj maroj daŭrigas ĉiun subteran ĉelon;  
Tra l' mallumo ni vivas, kiu sunon diluas;  
La sterko sur la rozoj igas kreski la rozon.

Jen la Kio-a vero; ni ne scias Kialon,  
La enigmo de la Plurformanto nin konfuzas:  
La vivofluo povas utiligi fiaĵon;  
La sterko sur la rozoj igas kreski la rozon.





# Frederick Cogswell (1980)

## **A boy who loved birds    Knabo, kiu amis birdojn**

A boy who loved birds  
could never coax them to him  
nor join in their flight;

Knabo, kiu amis birdojn  
povis nek kaĵoli ilin  
nek aliĝi la flugadon;

a boy who loved flowers  
could not keep them from wilting  
when the fall frost came;


knabo, kiu amis florojn  
ne malebligis velkadon  
kiam la frosto alvenis;

and when an auto  
struck his dog, what could his love  
do to make it well?

kaj kiam aŭtomobilo  
frapis lian hundon, kiel  
la amo resanigos ĝin?

Then he tried prayer  
with all his heart, looked to heaven  
and got no answer.

Tiam li klopodis preĝi  
tutkore al la ĉielo,  
sed respondon ne ricevis.



After that, he knew  
that the world was indifferent,  
but he kept caring,

learning as he grew  
not to live for power but  
for feeling, being;

like other insects  
in a giant universe,  
he went on his way,

alive in his self,  
thanks to the dumb charity  
of soil, sea and sun.

Poste, kvankam li sciis  
la mondon indiferenta,  
li daŭrigis sian prizorgon;

lernante, dum li elkreskis,  
ne cele al potenco vivi  
sed por sento, esto;

kiel aliaj insektoj  
en giganta universo,  
li iris per sia vojo,

vivante en sia memo,  
dank' al stulta karitato  
de tero, maro kaj suno.



# DIVERSAĴOJ

## El Italio, deziras korespondi

Saluton,

Mi nomiĝas Ivan kaj ŝatus korespondi kun alilandaj esperantistoj. Mi estas 42-jaraĝa, itala, laboras en kultura instituto kaj studemas historion, filozofion kaj lingvojn antikvajn kaj modernajn, krom la planlingvoj.

Atendante respondon, mi sendas korajn salutojn,

**Ivan Orsini**  
[ivarpas@yahoo.it](mailto:ivarpas@yahoo.it)




# Nova kaj plibonigita Lernu.net!

[laŭ [esperantic.org](http://esperantic.org)]

La teamo de [lernu.net](http://lernu.net) ĝojas anonci la plenan relanĉon de la paĝaro. La nova lernu.net enhavas novan interesan kurson de Esperanto kun centoj da ekzercoj, ilustraĵoj kaj granda serĉebla biblioteko. La retejo estas plene modernigita kaj funkcias kun novaj retumiloj kaj retaj teknologioj, kiuj ne ekzistis kiam la antaŭa versio de la paĝaro estis lanĉita.

La plena 26-leciona kurso de la nova paĝaro estas bazita je rakonto de konata verkisto Anna Löwenstein, kun ekzercoj de edukisto Birke Dockhorn. La kurso havas abundajn ekzercojn, ilustraĵojn, kaj sonojn, kaj sekvas la gvidliniojn de KER (Komuna Eŭropa Referenckadro) pri lingvolernado. La nova paĝaro ankaŭ enhavas detalan gramatikon de Esperanto kaj referitajn foruman sistemon, vortarojn, kaj tradukilon. La teamo daŭre aldonas novajn materialojn kaj funkciojn al la nova paĝaro, do revizitu ĝin ofte por vidi la ŝanĝojn kaj plibonigojn!





Lernu.net ekestis kaj ekzistas dank' al malavara subteno de ESF, kiu, siavice, ekzistas dank' al malavara subteno de ESF-subtenantoj, al kiuj ni aparte dankas. Kiel skribis Fernando Maia Jr., Brazilo, «Mi donacas al ESF, ĉar mi konsentas kaj fidas je la realigata laboro. ESF tenas kaj subtenas kelkajn el la plej gravaj spacoj por Esperanto en la reto, ĉiam kun moderna rigardo kaj entuziasmigaj rezultoj.»

Ni petas vin konsideri fari donacon al ESF/Lernu ĉi-jare: [esperantic.org/donations](https://esperantic.org/donations) (eblas donaci unufoje aŭ ĉiumonate). Eblas ankaŭ donaci al UEA-konto: esfo-p aŭ per ĉeko:

Esperantic Studies Foundation,  
COP Ste. Catherine,  
CP 60502, Montréal  
QC H1V 3T8, Canada.

Nu. Ĉi tie finiĝas la revuo.  
Komentu ĝin, skribu al ni, sendu  
kontribuaĵojn, kaj atendu la vintran  
numeron de Lumo!